

# NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

💻 esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj:** Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**NOVEMBRO/DECEMBRO 2015**

**Nro. 105 (4/15)**

AITOR ARANA

*EUSKARA - ESPERANTOA*

*ESPERANTOA - EUSKARA*

**HIZTEGIA**

*EŬSKA - ESPERANTA*

*ESPERANTA - EŬSKA*

**VORTARO**



**EŬSKA ESPERANTO-ASOCIO**

Elstara verko de Aitor Arana, prezentita la 17-an de oktobro, en Lojolo, loko kie troviĝas la fama baziliko.

**LOKE ...**

## **FIESTA DE ZAMENHOF – ZAMENHOFA FESTOTAGO.**

Como ya es habitual, también este año nos reuniremos para celebrar el aniversario del nacimiento del creador del Esperanto.

Día: **Sábado 12 de Diciembre.**

Hora: 7:30.

Como de costumbre, habrá una breve charla sobre los principales hechos acaecidos durante el año y, a continuación, nos reuniremos alrededor de una mesa para dar cuenta de la comida aportada por los asistentes.

## **KRISTNASKA LOTERIO.**



Un año más, tenemos ya lista la lotería de Navidad del grupo, con billetes totalmente en Esperanto. Conviene no dejar la compra para el final: el año pasado hubo quien se quedó sin lotería al haberse agotado.

Así mismo, no hay que olvidar que puede hacerse la **compra por internet**: para ello, hay que ingresar el importe (5 euros por billete) en la cuenta del Grupo (ver la primera página de esta circular); después de la recepción del dinero, se enviarán los billetes, escaneados, a la dirección de e-mail que se nos indique.

## Eŭska-Esperanta/Esperanta-Eŭska Vortaro.



La 17-an de oktobro okazis la oficiala prezento en Esperantio de la Eŭska-Esperanta/Esperanta-Eŭska Vortaro fare de ties aŭtoro Aitor Arana. La gravan eventon partoprenis la Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao (sur la foto, la plej proksima al la fotisto)

## **EUSKARA-ESPERANTOA-EUSKARA HIZTEGIAREN AURKEZPEN**

Urriaren 17an, Azpeitiko (Gipuzkoa) Loiola auzoan Euskara-Esperantoa-Euskara hiztegi handiaren aurkezpena egin zen. Aurkezpena egileak berak egin zuen, Aitor Arana jaunak, lagun arteko giro esperantistan. Hiztegia ikusgarria da, 740 orrialdekoa, eta urte askoko lanaren emaitza da. Aurrerantzean erreferentzia lana izango da bi hizkuntzen hiztunentzat. Zuzenketa lana Wim Jansen irakasle nederlandarrak egin du, eta argitalpenaren erantzulea Euskal Esperanto Elkarte da. Aitor Arana egilea euskal idazle ezaguna da eta sari ugari jaso ditu. Esperantozko itzulpenak egin ditu eta, besteak beste, B. Atxaga, M. Landa eta P. Zubizarreta itzuli ditu. Esperantoa ikasteko ikasliburu bat ere argitaratu zuen.

Batez ere euskal esperantistentzat egindako aurkezpenaren ondoren, komunikabideen aurreko aurkezpena ere izango da. Liburua Euskal Esperanto Elkarteari eska dakioko, UEAko salmenta zerbitzuari eta beste talde esperantista batzuei. Euskal Herriko Hontza, Katixa eta Katakarak liburu-dendetan ere eskura daiteke.

## CUOTAS DEL AÑO 2014.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una “X” roja, es que aun no has pagado, a la fecha de cierre de este “Nia Ponto”, la cuota de socio correspondiente al año 2015; te recordamos que las cuotas, vigentes desde hace varios años, son:

Cuota normal: 30,00 euros anuales.  
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.  
Cuota familiar: 45,00 euros anuales.

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

## «Hemos cantado hasta en esperanto, ya solo nos falta el euskera»



Rodrigo Aboitiz, de origen vizcaíno, e Ignacio Redard forman el dúo chileno Plugin. Influenciados por Depeche Mode, presentan en Euskadi 'Cambiando', «pop electrónico, con énfasis en el pop».

Se presentan como chilenos, pero sus raíces cruzan océanos y tocan fondo en Euskadi. «Mi padre era de Gernika y mi madre de Logroño, así que siento este sitio muy cerca», dice Rodrigo Aboitiz.

Pisan tierras vascas por primera vez «como banda» y juegan con la idea de incluir la lengua local en su discografía. «Ignacio tiene la doble nacionalidad estadounidense y chilena por lo que canta tanto en inglés como en castellano. También tenemos canciones en alemán y esperanto. Ya solo nos falta el euskera».

*(“El Correo”, cxefa jxurnalo de Bilbao. 29/10/2015)*

## VENONTAJ E-ARANGŬOJ.

**30 jun-04 jul. 2016.** 75-a Hispana Kongreso. Herrera del Duque (Ekstremaduro).

**16-23. jul 2016.** 72-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Wrocław, Pollando.

**23-30 jul. 2016.** 101-a Universala Kongreso. Nitra (Slovakio).



**julio 2017.** Karavano al Seulo - Rusio-Koreio. Korea Esperanto-Asocio invitis UKon 102 de jaro 2017 en Seulo, Koreio. La Vojaĝo anoncas novan projekton, Karavanon al Seulo por partoprenantoj de planata kongreso. Laŭ anticipa plano ĝi itineros laŭ la fama Trasiberia fervojo (9298 km/ 4,607 mejla), la plej longa fervoja itinero en la mondo. inf.: La Vojaĝo.

## FORPISIS NIA AMIKO DARÍO RODRÍGUEZ.

Nia karega amiko Darío Rodríguez forpasis hodiaŭ. Lia fratino ĵus informis nin ke dum la lastaj tagoj lia sanstato rapide malpliboniĝis, kaj li mortis ĉimatene.

Por madridanoj: lia korpo troviĝas nun en la funebrejo de la M-30, ĝis morgaŭ je la 12,00 kiam li estos kondukita al la tombejo de La Almudena (kaze ke iu povas akompani lin kaj la familion matene)

Li lasas multajn amikojn kaj ege rimarkindan laboron, kiun ni ĉiam memoros. Li pace ripozu!

*(José Antonio del Barrio. Federación Española de Esperanto (HEF). 14/10/2015)*



La 14-an de oktobro forpasis en Madrido la veterana kaj tre aktiva esperantisto Darío Rodríguez López de Silva. Kvankam 84-jara (li naskiĝis en aŭgusto 1931), li estis tre agema ĝis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam li devis esti enhospitaligita. Eĉ se komence aspektis ke la malsano estis zorgiga sed ne danĝera, en la lastaj tagoj lia sanstato subite malpliboniĝis kaj li forpasis en la mateno de tiu tago.

Darío lernis Esperanton tre juna, kaj komencis aktivi en la madridaj esperantistaj rondoj kiuj iom post iom ekvekiĝis post la neniigo kaŭzita de la enlanda milito. Li estis unu el la renaskigantoj de la Madrida E-Grupo kaj de Hispana Esperanto-Federacio, kaj jam en 1954 li estis nomumita voĉdonanto de la estraro de HEF prezidita de doktoro Herrero, nome de la madridaj esperantistoj.

Tie li estis respondeculo pri la servo pri gazetaro kaj radio. Li estis aktiva en la disvastigo de nia lingvo en amaskomunikiloj kaj eĉ gvidis programon pri Esperanto en la radio. Li ankaŭ estis sekretario de la Organiza Komitato de la 18-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Madrido, julio 1957.

En la 60-aj kaj 70-aj lia agado draste malpliĝis, ĉefe pro personaj kaŭzoj, kaj al tiu periodo li poste nomis (eble iom troige) sia kabeiĝo.

Tamen, post sia memeritiĝo li revenis al la movado kun rimarkinda forto. Malgraŭ sia aĝo li tre bone regis la retajn ilojn, kaj dediĉis sian aktivadon ĝuste al la partopreno en la unuaj retaj forumoj kaj al la interŝanĝo de novaĵoj de iuj partoj de la movado al la aliaj, super la landlimoj. Tiel, li fariĝis tre konata en internaciaj medioj, kiel atestas la fakto ke el ĉiuj partoj de la mondo venis monroj de kondolencoj kiam oni ekkonis lian forpason. Ĉiuj reagoj substrekas lian afablecon kaj helpemon, kaj tia li restos en ĉies memoro.

*(El la retejo de Hispana E-Federacio)*

Darío estis ofta kunlaboranto en « Nia Ponto » kaj ankaŭ tre bona amiko de la bilbaoaj esperantistoj.

Ni kore sentis lian forpason.

## La Prezidanto de HEF vizitis la E-Grupon de Bilbao.



La 19-an de oktobro vizitis nian Grupejon la Prezidanto de HEF, nia amiko Tonjo del Barrio. Sur la foto, ekde maldekstre, Tonjo del Barrio, Eduardo Larrouy, Jesús M. García kaj Pako López.

## HISPANA KONGRESO - VIZITO AL GUADALUPO.

La 3an de oktobro la Loka Kongresa Komitato de la 75 Hispana Kongreso de Esperanto kaj la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio vizitis la urbon kaj la monaĥejon Guadalupe (Guadalupe, Ekstremaduro). Al tiu ĉi loko direktiĝos la ĉefa ekskurso de la kongreso, kiu okazos komence de julio 2016, kaj kies ĉefa sidejo estos la proksima urbo Herrera del Duque.

La monaĥejo de Guadalupe estas vera juvelo de la hispana arĥitekturo, kun escepta riĉeco kaj havaĵo, kaj kun granda signifo historia kaj religia, ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en multaj landoj de Latinameriko. Pri la urbo kaj la monaĥejo eblas legi tre detalajn artikolojn en la esperanta Vikipedio, pli kompletajn ol eĉ tiuj de la hispanlingva versio.

Ni memorigas ke jam eblas aliĝi al tiu ĉi 75a Hispana Kongreso de Esperanto kaj ke la informoj pri ĝi iom post iom aperas en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso>.

(“La Bitbulteno”. HEF. Num. 21. 26/10/2015)

## ESTAS PRETIGATA LA HISPANLINGVA VERSIO DE DUOLINGO.

La tre sukcesa retejo por lernado de lingvoj Duolingo ĵus survoĝigis la pretigadon de Esperanto-kurso por hispan-parolantoj. Preparas la kurson Chuck Smith kaj la prezidanto de HEJS Alex Escobedo, kaj pliaj helpantoj povas sin proponi en la retejo.

Oni esperas ke post proks. duonjaro ĝi pretos. Interesitoj povas jam nun enskribiĝi por ricevi atentigon, kiam la kurso enretos. Jam pli ol milo da homoj anoncis sin ĝis nun.

La Duolingo-kurso por anglaparolantoj dume plu havas ĉiutage pli ol mil aldonajn eklernantojn; entute ĝis nun eklernis tie pli ol 160 mil homoj.

(“La Bitbulteno”. HEF. Num. 21. 26/10/2015)

## E-mapo en Hispanio.

Mi petas diskonigon al viaj membroj kaj nemembroj pri tiu ĉi plifaciligita indaĵo. Mi ŝatus atingi por Hispanio tiom da sukceso kiel usona aŭ brazilaj e-mapoj (ĉiuj ĝisnunaj mapoj ĉe <http://goo.gl/3qFPRm> ) kaj enmapigi pli da esperantistoj (ankaŭ la interesitojn eklerni, ktp), videbligi ilin kaj krei ligojn inter ĉiuj kiuj kredas sin solaj en hispana esperantujo.

Por tio, dum kongreso en Jerez mi iom enketis kaj alvenis al konkludo, por sukcesi pli da enmapigoj, ke nun ne plu nepros skribi straton (daŭre konsilinda, tamen) kaj homoj pli emos enigi la neprajn nomon, retpoŝton (kaŝebla al publiko) kaj urbon/vilaĝon. Mapo:<http://www.bit.ly/mapaESeo>

Por enmapigi plenumendas: <http://www.bit.ly/mapaESeo-entra>  
Tie ĉi vi devus rajti vidi reuzeblan tekston por instigi hispanlingve enmapigon:  
<https://facebook.com/events/628347763931794>

*(Alejandro Escobedo, prezidanto de reaktiviganta hispana e-junularo HEJS. 12/11/2015)*

## Aliĝo al HEF por 2016.

Jam pretas la aliĝilo, por fariĝi membro de Hispana Esperanto-Federacio por la jaro 2016:

<http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2016eo.pdf> (E-o)

<http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2016es.pdf> (hispane)

*(José Antonio del Barrio. Federación Española de Esperanto (HEF). 16/11/2015)*

## TRA LA MONDO ...

## GAJNIS la nomo ESPERANTO en la voĉdonado.

La pola ŝtata fervoj-entrepreno akceptis la trajno-nomon ESPERANTO! En la fino de la voĉdonado, anoncita semajnon antaŭe, la nomo Esperanto havis 3940 voĉojn, la nomo Narew 2509 voĉojn, Bojary 200 voĉojn.

La interurba rapidtrajno "IC Esperanto" funkcios ekde decembro, kaj denove aŭdeblas la nomo Esperanto en polaj stacidomoj. *(Pli frue jam funkciis trajno kun la sama nomo inter Białystok kaj Warszawa, sed ĝi estis nuligita en junio 2013, ĉar uzis ĝin nesufiĉe multaj pasaĝeroj.)*

En <https://www.facebook.com/PKP.Intercity?ref=stream> estas publikigitaj la akceptitaj nomoj de ĉiuj 10 trajnoj, por kiuj fejsbukanoj voĉdonis:

1. Warszawa – Białystok --> Esperanto
2. Warszawa – Olsztyn --> Kortowo
3. Warszawa – Łódź --> Uszatek
4. Warszawa – Łódź --> Deyna
5. Gdynia – Wrocław --> Bursztyn
6. Gdynia – Wrocław --> Błyskawica
7. Katowice – Poznań --> Koziółki
8. Warszawa – Bydgoszcz --> Łuczniczka
9. Warszawa – Bydgoszcz --> Kujawiak
10. Warszawa – Lublin --> Bystrzyca

*(Szilvási László. Ret-Info, LS. 06-10-2015)*

## “Nia Vortaro” por latinoamerikanoj.

[Http://esperantorondo.blogspot.com.ar/2015/11/nia-vortaro-por-latinoamerikanoj.html](http://esperantorondo.blogspot.com.ar/2015/11/nia-vortaro-por-latinoamerikanoj.html)  
(Sendita de "Ro. Sartoro" rosartoro@gmail.com. 18/11/2015)

## DUOLINGO-KURSO POR HISPAN-PAROLANTOJ EKPREPARATA.

Ĵus komenciĝis ĉe Duolingo la preparado de "Esperanto for Spanish speakers" - <https://incubator.duolingo.com>, en Incubation Phase 1. La preparado de la versio por anglalingvanoj daŭris proks. dek monatojn - supozeble ĉi-foje pretiĝos pli rapide... :)

Intertempe estas registritaj 165.000 Esperanto-lernantoj en la angla lingvo ĉe duolingo.com; proks. 1100 novaj lernantoj tage. Vidu ĉe Incubation Phase 2.

(Szilvási László. Ret-Info, LS. 19-10-2015)

## UNESCO kaj mortodatreveno de Zamenhof.

Unesco rekomendis en 2017 la solenado de 57 gravaj personecoj, al kiuj apartenos ankaŭ Zamenhof, kies 100-a mortodatreveno la 14-an de aprilo 2017 oni solenu!

(Prenita el reta diskutejo “komitato-de-UEA”. 21/11/2015)

## SERĈATA: NOVA REDAKTORO DE "ESPERANTO".

Laŭ interkonsento kun la Estraro de UEA, la nuna redaktoro de *Esperanto*, Fabrício Valle, finos sian laboron en tiu posteno per la aprila numero de la jarkolekto 2016.

Tial UEA nun invitas kandidatiĝojn por transpreni la redaktadon de la revuo ekde numero 2016:5. Tio signifas eklabori jam komence de aprilo 2016. La sukcesa kandidato ricevos kontrakton por finredakti la jarkolekton 2016; decido pri renovigo/plilongigo estos farita en oktobro 2016.

(Francisco Javier Moleon. 19/11/2015)

**LA GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO DEZIRAS  
AL ĈIUJ SIAJ MEMBROJ, AMIKOJ KAJ  
SIMPATIANOJ SUKCESAN KAJ ĜOJIGAN  
JARON 2016.  
ESTU FELIĈAJ!!!**